



aktuala

34-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Glady, cglady@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝkesto nek telefono). Informoj: <http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> www.esperanto.be www.esperanto.net <http://eo.eventeo.net>

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne spegulas nepre opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri Lidia Zamenhof (3a parto)
- Paĝo 3 - EU-parlamentanino esperas je Esperanto
- Paĝo 5 - Esperanto en 1898
- Paĝo 6 - Kiu estis Kabe
- Paĝo 9 - Poemaro: Bronŝtejn, Alberto Garcia, Pessoa
- Paĝo 10 - Rekomendo pri la refleksivo
- Paĝo 11 - Eraroj de la akamedianoj, Akademio de Esperanto
- Paĝo 13 - Agado de Esperantista Brusela Grupo

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Marto 2009

- 4 Katarzyna Kuske pri la tago de la virino
- 11 José Augusto Pinto de Sousa pri pola radio en esperanto
- 18 Bernard-Regis Larue pri unuaj malkovroj de la planedo Marso
- 25 André Demarque pri tradukekzerco en Esperanton de leteroj de Van Gogh

Aprilo 2009

- 1 Kostjantin Demjanenko el Ukrainio pri iĥtologio en Maro Azova
- 8 Michael Cwik gvidas diskuton pri lingva strategio
- 12 *Paska dimanĉo*
- 15 Hélène Falk-Bracke pri kanzonoj kaj folkloraj kantoj de Zamenhof-a tempo
- 22 Jan Amadori pri kaprompiloj, ludenigmoj, puzloj
- 29 Marcel Delforge pri vojaĝoj en Pollando

Majo 2009

- 6 Semajna kunveno
- 13 Bernard-Regis Larue pri lastaj novaĵoj de la planedo Marso
- 20 Semajna kunveno
- 27 Semajna kunveno

En aprilo 1926, Marta Root ricevas permeson paroli en la ceremonio de senvualigo de monumento starigota sur la tombo de Zamenhof. Ŝi parolas pri rilatoj inter Esperanto kaj Bahaismo. Ŝi ŝatus plulongigi sian restadon en Varsovio, kaj Lidia akceptas ŝin en la hejma domo: Marta helpas Lidian en la lernado de la angla, kaj Lidia perfektigas ŝian konon de Esperanto. Post kelkaj semajnoj, Marta daŭrigas sian vojaĝon; Lidia iĝis « ŝia spirita filino » kaj Marta « ŝia spirita patrino ». La vera patrino de Lidia, Klara Zamenhof-Zilbernik, mortis jam en 1924.

Lidia plu partoprenas la Universalajn Kongresojn, ekcepte Köln en 1933 (la kontraŭjuda sinteno de Hitler jam komenciĝis); ŝi partoprenos ankaŭ la kongreson de **Vieno** en 1936, kiun ĉeestos la tuta idaro de Zamenhof; Adamo, lia edzino Wanda (naskita Frenkel), ilia dekjara filo Ludwik, Zofia kaj Lidia.

Kiel sin vivtenas Lidia dum tiuj jaroj? Ŝi instruas Esperanton, ŝi publikigas proprajn rakontojn en « La Pola Esperantisto » kaj esperantigas verkojn el la pola literaturo; ekzemple **QUO VADIS** verkitan de Henryk Sienkiewicz.

En 1930, survoje al la kongreso de Oksfordo, ŝi partoprenas **Cseh-kurson** en Arnhem. Ŝi entusiasmigas pri tiu rekta metodo, kaj tuj adoptas ĝin. En 1931, ŝi instruas en Svedio. Fine de la jaro, la Esperanto grupo de **Lyon** (Francio) invitas ŝin por unu jaro de instruado en diversaj Esperantaj grupoj. La sukceso estas tiel granda, ke ŝi estas petata resti unu jaron plie, kion ŝi akceptas. De tiam ĝis printempo de 1937, ŝi instruos multe en Francio, kie la sukceso estas la plej granda; la nombro de kursanoj ĉiam superos cent! De tiu tempo datiĝas la plej nombraj Zamenhof-stratoj de Francio.

Dum la tridekaj jaroj ŝi estas aktiva **pac batalanto**. Ŝi parolas multe pri la rolo, pri la rajtoj de la virinoj en tiu evoluo « ĝis nun, la mondo estis regata de viroj: la rezulto estas sinsekvo de militoj. Se la virinoj havus povon en tiu rondo, ili ne sendus edzinojn kaj filojn al la buĉado ». Ŝia alparolado en la Viena UK de 1936 estas perlo de literaturo. Ĝi aperas en la libro (p. 228) kun aliaj kompletaj tekstoj aŭ eltiraĵoj de ŝiaj famaj paroladoj, aŭ leteroj. (« eĉ Dio estas viro! ») Tiel, eblas konvinkiĝi pri ŝia verkista stilo kaj talento.

Ŝia « spirita patrino » Marta Root, aranĝis jam de longe kursojn en Usono. Lidia enŝipiĝos fine de **septembro 1937** por **USONO**, invitita de la Esperantista kaj de la Bahaa movado. La libro rakontas detale pri ŝia restado en Usono. Montriĝas ke usonaj bahaanoj estas tute indiferentaj pri Esperanto kaj ĝenerale pri fremdaj lingvoj. Post kelka tempo, Lidia hezitas ĉu resti en Usono aŭ reveni hejmen, ĉar nova leĝo en Polio proklamas ke poloj kiuj instaligis en fremda lando perdos sian polan naciecon post 5 jaroj. Findecidos tamen la usona Administracio: ŝia vizo ne plu validas kaj ne povas esti pluvalidigita post la 10a de Oktobro 1938. *Hélène Falk-Bracke*

HAGA INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

La fondaĵo **Internacia Esperanto-Instituto (IEI)** estis kreita de Julia Isbrücker kaj Andreo Cseh en 1930. En la jaro 1933 IEI ekposedis sian propran oficejon ĉe la adreso Riouwstraat 172 en Hago, kie ĝi hejmas ankoraŭ hodiaŭ.

La hungardevena Cseh inventis **rekta instrumentodon de Esperanto**, sen apogo de la gepatra lingvo de la lernantoj. Miloj da personoj el la tuta mondo tiel lernis la lingvon dum la periodo inter la du mondmilitoj. En Nederlando troviĝis inter ili ekzemple la posta ĉefministro Willem Drees.

Dum la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento IEI edukis pli ol 400 Cseh-metodajn instruistojn. Kvardeko el ili migris ĉefe tra Eŭropo, donante kursojn. Dum tiu epoko multaj Cseh-metodaj kursoj kaj konferencoj pri la instrumentodo estis organizitaj en vilao apud la orient-nederlanda urbo Arnhem, la t.n. **Esperanto-Domo**, kiun la urbestro disponigis al IEI.

Nuntempe IEI disponas pri **36 diplomitaj Cseh-metodaj docentoj** el plej diversaj landoj en la mondo. Ili okazigas 100-200 kursojn ĉiujare. Krom tio IEI organizas dekon da seminarioj ĉiujare por eduki novajn docentojn.

Interalie pro tio, ke nuntempe Esperanto estas pli ofte studata aŭtoididakte aŭ pere de interretaj kursoj, la agadoj de IEI prioritare limiĝas al la okazigo de kursoj. En la Haga oficejo estas ankaŭ organizataj **studsemajnfinoj** pri temoj rilate al la Esperanto-kulturo.

IEI ankaŭ **publikigas librojn**, ne nur sur la kampo de la instruado, sed ankaŭ pri la historio de Esperanto. La instituto vendas tiel novajn kiel brokantajn librojn en Esperanto.

IEI kunfinancas la eksterordinaran **katedron pri Interlingvistiko kaj Esperanto** ĉe la Universitato de Amsterdamo.

Krome, IEI subtenas la avoluigon de **nova tehnologio kaj lingvokomputiko** por ciferecigi librojn kaj plibonigi ties alireblecon per interreto.

De 1998 Direktoro de la Instituto estas Atilio Orellana Rojas.

<http://www.iei.nl>



Unua foto: Estraro: Prezidanto E. Borsboom; Kasisto E. Burg; Sekretario C.A. Bos Tehnologio Toon Witkam; Membro P. A. Buijsters. Dua foto: Sidejo: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat, 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando, Telefono +31 70 3556677, Fakso +31 70 3584422, iesperanto@versatel.nl. Tria foto: Direktoro: Atilio Orellana Rojas

EU-PARLAMENTANO ESPERAS JE ESPERANTO

Ljudmila Novak, slovena ano de la Eŭropa Parlamento, prezentis al la parlamenta komitato pri kulturo kaj eduko proponon pri enkonduko de Esperanto kiel komuna lingvo de Eŭropa Unio. Responde al demandoj de Libera Folio Ljudmila Novak klarigas, ke la propono certe estos malakceptita en voĉdonado, sed ke ŝi tamen povas utili por krei diskutojn pri lingvaj problemoj kaj la eventuala rolo de Esperanto.



Ljudmila Novak estas ano de la kristdemokrata grupo de la Eŭropa Parlamento, kaj mem en sia junaĝo studis

Esperanton, kiun ŝi tamen ne plu aktive uzas. En 2007 ŝi partoprenis la 7-an kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio en Slovenio.

Ŝia propono pri Esperanto estis prezentita la 21-an de januaro 2009, kiam la parlamenta komitato pri kulturo kaj eduko traktis raporton pri multlingveco. Laŭ ŝia amendopropono, al la raporto devus esti aldonitaj tri punktoj kun la jena enhavo:

...konstataj ke la *principo de estimo de egalrajteco ne povas esti certigita dum oni uzas nacian lingvon (la anglan) kiel "lingua franca"*.

...proponas, ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, respektante lingvan diversecon kaj stimulant lernadon de diversaj lingvoj oni pristudu la eblecon kaj utilecon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Nur ĝi povus faciligi interkompreniĝadon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝi estas simpla por lernado kaj uzo.

...konstataj, ke la enkonduko de eŭro kiel komuna eŭropa monunuo ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kresko kaj pli granda stabileco en

EU. Similajn efikojn povus havi ankaŭ enkonduko de komuna komuniklingvo, kiu ja neniel forigus aŭ limigus uzon de naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.

Al Ljudmila Novak turnis sin rekte *Libera Folio* por ricevi pliajn informojn:

Libera Folio: Kial vi decidis fari vian proponon pri Esperanto?

Ljudmila Novak: Ĉar la interkompreniĝado en EU estas malfacila, kvankam oni lernas fremdajn lingvojn. Ne estas juste ke unu nacia lingvo (la angla) estu uzata kiel komuna lingvo.

Kion vi opinias pri la nuna lingva politiko de la oficialaj EU-instancoj?

- EU ege klopodas konsideri ĉiujn oficialajn lingvojn en EU kaj agas por fortigi la principon de plurlingveco. Malgraŭ tio la plimulto de la dokumentoj almenaŭ en la komenca fazo estas en la angla aŭ la franca kaj tial aliaj lingvoj ne estas egalrajtaj.

Kian rolon Esperanto laŭ vi povus havi en la oficialaj EU-instancoj, kaj pli vaste en EU?

- Esperanto povus esti, gardante samtempe la naciajn lingvojn, komuna lingvo por komunikado inter ŝtatoj de diversaj nacioj, speciale ĉar ĝi estas facila kaj povus rapide lerni ĝin ankaŭ lingve malpli talentaj ĉivitanoj.

Ĉu okazos diskuto pri via propono? Se jes, kiam? Kaj kiajn argumentojn vi tiukaze uzos en la diskuto kaj kian rezulton vi atendas?

- La debato pri mia propono jam okazis antaŭe en la Komitato por kulturo la 19-an de januaro 2009. Nun mi ankoraŭ ne havas multajn subtenantojn. Mi deziris atentigi la komitatanojn kaj pensigi ilin pri tiu ĉi eblo. Miaj amendoj estos malakceptitaj dum la voĉdonado, sed oni legos ilin kaj pri ili diskutos en ĉiuj politikaj grupoj.

Ljudmila Novak alvokas ĉiujn subtenantojn de la propono esprimi sian apogon por ĝi en ŝia retejo.

Libera Folio

VERDA STELO, KORUSO MADRIDA

25 jaroj de kantado en Esperanto. La koruso Verda Stelo estis kreita de Pedro Vilaroig kaj Juan Carlos Ruiz en la jaro 1984, ene de Madrida Esperanto-Liceo, kun la celo krei novan koncepton de muzika ludado. La koruso komencis kanti en Esperanto, unue en

malgrandaj esperantistaj kunvenoj kaj iom post iom etendante siajn ludadojn al pli ampleksa spaco. Ĝi riĉigis sian repertuaron per folkloro kaj klasikaĵoj en aliaj lingvoj, cele al aŭdaca kaj ampleksa formo de arta ludado.

Okaze de la Universala Kongreso de Esperanto ĝi prezentis, en la Muzika Palaco de Valencio, la kantaton en Esperanto "La profil' de viaj spuroj", komponita, surbaze de teksto de Miguel Fernández, fare de ĝia direktoro kaj fondinto Pedro Vilaroig, akompanata de la Simfonia Orkestro de Valencio. La koruso Verda Stelo estas membro de la Korusa Federacio de Madrido, partoprenante en ĝiaj aktivecoj ene kaj ekster la Madruda Komunumo.

Korusa Asocio Verda Stelo stariĝis oficiale en Madrido la 12an Decembro 1985. La celoj de ĉi asocio estas: 1:Promocii inter siaj membroj la emon al la korusa muziko en ĉiuj landoj kaj kulturoj. 2:Promocii inter siaj membroj la intereson por la internacia lingvo Esperanto kaj ĝia rilato kun la muziko kaj la folkloro. 3:Disvolvi sociajn, kulturajn kaj muzikajn aktivecojn same enlande kiel eksterlande, kun speciala atento al la publika prezentado de korusaj komponaĵoj. 4:Esti vehiklo de kultura interŝanĝo inter diversaj etnoj per la muziko kaj la lingvo Esperanto.



Verda Stelo, koruso aŭ ĥoro Madruda



En la jaro 1987 estiĝis Orkestro Verda Stelo, kiu koncertis kaj akompanis la koruson dum kvin jaroj. Nuntempe la koruso, direktita de Laura Carballo, havas proksimume tridek gekantistojn kaj faras siajn kantoprovojn en la

preĝejo San Francisco el Grande de Madrido; en ĉi preĝejo ĝi partoprenis en kelkaj elsendoj de la Hispana Televido. Ĝia partopreno estas petata por ĉiaspecaj prezentadoj, kiuj ampleksas konkursojn (Habaneras de Torrevieja), recitalojn en privataj centroj, akademijaj eventoj, kulturcentroj, geedziĝoj, kongresoj, omaĝoj, Nacia Aŭditorio, Teatro Monumental, ktp. (ĝi estis alvokita por la amasa koncerto en Madrido, fiaskinta pro la pluvo, de la franca muzikisto Jean Michele Jarre).

Lastatempe (11an Januaro 2009) ĝi aperis en la programo "Conciertos" de la dua ĉeno de la Hispana Televido, en kiu ĝi partoprenis en la prezento de la "zarzuela" "Viva la Verbena", de Luis Aguilé. Ĝia repertuaro en Esperanto estas vasta; en ĝi elstaras la "Ave Maria" komponita de Pedro Vilaroig.

Augusto Casquero de la Cruz

VALENCIA PREZIDANTO OMAĜITA



Valencia Grupo omaĝas sia prezidanto

La 14an de Februaro 2009, en la sidejo de Esperanto Grupo Valencia (Hispanujo) okazis la Jara Ĝenerala Asembleo de ties membraro. Fine de la kunveno oni faris kortuŝan omaĝon al la prezidanto, S-ro José Pérez Sempere, pro lia grandega, multjara, sindona laboro por la asocio. Oni enmanigis al li belan memorŝildon, por kies aĉeto kontribuis la membroj. S-ro Sempere estas la animo de la Grupo, konstanta laboranto, ĉeestanto, solvanto de problemoj, dum multaj jaroj li tenis viva la torĉon de Esperanto en Valencio, kaj la amikecon inter la membroj.

Augusto Casquero de la Cruz

ESPERANTO EN 1898

Literatura retrevuo "La Karavelo" memorigante la centjariĝon de la morto de la brazila dramisto, poeto kaj rakontisto Arturo de Azevedo (1855-1908) re-publikas lian interesan artikolon aperigitan je la 12an de Aprilo 1898 en la gazeto "O Paiz" (La Lando), de Rio de Janeiro, kun traduko de Rogero de Castro Gotardi.

En 1887, d-ro Zamenhof - pro tiu "of" en finaĵo ĉiuj jam scias, ke temas pri ruso - verkante sub la pseŭdonimo "Esperanto", kreis internacian lingvon multe pli akceptindan, multe malpli komplikan, ol la furoran "Volapukon", kiun mi vane pretendis lerni.

La nova lingvo, konata, pro tiu pseŭdonimo, per la nomo "Esperanto", jam antaŭ 10 jaroj estas vaste disvastigata, kaj jam havas multenombrajn adeptojn en ĉiuj partoj de la mondo.

En Januaro de ĉi tiu jaro, estis fondita en Parizo, la "Société pour la propagation de l'espéranto" kaj estis publikigita la unua numero de "L'espérantiste". S-ro Jacomo Martins Baggi de Araŭjo, kiu rezidas en Petropolis, apud Rio de Janeiro, kaj verŝajne estas la brazila disvastigisto de la nova lingvo, sendis al mi ekzempleron de tiu gazeto.

La rapida tralego de la periodaĵo kaj de la kurioza broŝuro ĝin akompananta, en kiu troviĝas kelkaj eroj de la vortaro kaj de la gramatiko de Esperanto, senserĉe donis al mi kelkajn nociojn. Se mi havus tempon por tio, mi estiĝus fervora esperantisto.

Okazas ke "Esperanto" estis laŭdata de Max Müller, kiu laŭdire estas la plej granda lingvisto de nia epoko, kaj ĝi ricevis laŭdojn ankaŭ de Tolstoj, Henri Phillips kaj de aliaj tutmonde rimarkindaj homoj.

Tolstoj skribis la jenon: "Esperanto estas tiel facile lernebla, ke mi, ricevante gramatikon, vortaron kaj kelkajn artikolojn en tiu lingvo, post du horoj, sukcesis, ne skribi, sed almenaŭ ĝlate legi en tiu lingvo". Estas vere ke ne ĉiuj havas inteligenton de Tolstoj...

Mi ne volas devojiĝi en konsiderojn, kiuj kompreneble troviĝas en la menso de ĉiuj miaj legantoj, pri la konveneco de lingvo internacia; mi simple rekomendas Esperanton, kiu, mi esperas, eliros la venkinta el sia profunda disvastigado.

Mi finas tian leĝeran artikolon, transkribante la "Patron Nian", en nian lingvon:

"Patro nia, kiu estas en la ĉielo, sankta estu via nomo, venu regeco via; estu volo via, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Panon nian ĉiutagan donu al ni hodiaŭ; kaj pardonu al ni ŝuldojn niajn, kiel ni ankaŭ pardonas al ŝuldantoj, kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono, Amen."

Unuavide, ĝi ŝajnas la provenca aŭ la kataluna - sed kreu, ke ĝi estas nenia Kimero".

www.esperantopt.com

LEMAIRE, LA BELGA KABE

Antaŭ cent jaroj ekaperis en Belgio ĝermo de la naskiĝanta Esperanto-afero. Jen unu el ĝiaj pioniroj: Charles Lemaire. Kvankam jam pli frue kelkaj belgoj lernis esperanton, la unua kiu vere aktivis per propagando estis la armea oficiro Charles Lemaire (1863-1926), kiun Zamenhof iam nomis "la vera patro de la belgaj esperantistoj", sed kiu post 1908 malaperis de la scenejo. Sed lia grandega rolo en la Esperanto-afero meritas apartan memorigon. Charles Lemaire naskiĝis (26 marto 1863) en Cuesmes, perdis frue siajn gepatrojn kaj konis multan mizeron. Sed bonaj studrezultoj kondukis lin al la Armea Altlernejo de Belgio, kie li en 1886 akiris leŭtenantan gradon. De 1889 li kariere en Kongo, sendependa ŝtato kreita de la belga reĝo Leopoldo la 2-a. Plurfoje komisiita pri sciencaj ekspedicioj en Afriko, li rapide promociiĝis (kapitano en 1898, kapitano-komandanto en 1902).

Letero en la unua vespero: En 1897 Lemaire hazarde eksciis pri iu rapide lernebla internacia lingvo, el franca broŝuro de iu "de Beaufront". Li trastudis ĝin en unu posttagmezo kaj vespere jam skribis en Esperanto al "de Beaufront". La baldaŭan respondon li tute komprenis, kio konvinkis lin pri la valoro de Esperanto. Li komunikis sian entuziasmon al anoj de Cercle Polyglotte ("multlingva rondo"), kies estrarano li estis, kaj en decembro 1897 prelegis al ili pri tiu mirinda Esperanto. Estante unu el la administrantoj de nova liberala ĵurnalo Brusela, "Le Petit Bleu", Lemaire povis konvinki la redakcion publikigi lian prelegon. Ĝi aperis en ok sinsekvaj eroj, de 17 decembro 1897 ĝis 1 januaro 1898, kaj poste ankaŭ kiel libreto: "L' Esperanto, solution triomphante du probleme de la langue universelle" (= Esperanto, triumfanta solvo de la problemo de universala lingvo). Li kovinkis influajn riĉulojn, inter aliaj "Solvay" kaj "Lambert", finance kontribui por distribui la libreton al universitatoj, bibliotekoj kaj alie. Poste li atingis ke "Le Petit Bleu" aperigu ĉiusemajne tekston paralele en Esperanto kaj Franca. Sed jam en aprilo 1898 Lemaire devis forvojaĝi al Afriko por trakontinenta esplorvojaĝo. Reveninte fine de 1900, li denove fervore ekagis por Esperanto, nun per bone planitaj strategioj. Li organizis prelegojn en universitatoj, instalas subtenan komisionon, stimulis starigon de lokaj grupoj kaj aliaj. Plej grave, li lanĉis kaj mem financis nacian Esperanto-revuon, "Belga Sonorilo". Nova ekspedicio tenis lin for de junio 1902 ĝis la fino de 1905. Ĉe sia reveno li trovis

evoluintan situacion: ekzistis jam pluraj agemaj grupoj, kaj la 30-an de julio 1905 estis fondita Belga Ligo Esperantista (BLE), kie prezidantecon oni rezervis por li. Informite pri la sukceso de la unua Universala Kongreso en Buljono-ĉe-Mar (1905), Lemaire proponis prelegon por la sekva Universala Kongreso pri siaj Afrikaj spertoj. La prelego "Tra Mez-Afriko" en la Geneva Universala Kongreso (1 de septembro 1906), kun abundaj lumbildoj, impresis la Genevan publikon. Aperinta ankaŭ libroforme, ĝi estas unu el la unuaj valoraj kontribuoj al la scienca Esperanto-literaturo. La famo de Lemaire rapide disvastiĝis en la juna movado, kaj li inspiris eĉ Jules Verne por "Voyages d' etudes" (= Esplorvojaĝoj), romano Esperanto-rilata, kiu restis nefinita pro la morto de la aŭtoro en 1905. Ĝia Esperanto-traduko aperis en 1994, kiel numero de Franca Esperantisto.

1907, Jaro duoble fatala: Sed fiaj politikaj cirkonstancoj kaj stranga konflikto kun la reĝo abrupte finis la kariieron de Lemaire en januaro 1907. Dum tuta jaro li devis defendi sin kontraŭ akuzoj, verki tekstojn pri Afrikaj spertoj, interveni en politikaj aferoj kaj aliaj. Nur 44-jaraĝa, li decidis peti sian pension kaj retiriĝi al farmbieno. Kiam en 1907 aperis Ido, Lemaire - jam favorinta modifojn en Esperanto - distanciĝis de la klasika Esperanto, ignorante ke elprovita lingvouzo pli voloras ol eksperimentado. En la fino de 1908 li eĉ eksciis kiel prezidanto de BLE, kunprenante sian revuon, kiu de tiam uzis Idon. Sed certe li iom post iom konstatis ke la Ido-movado malsukcesus, dum la Esperanto-movado plu bone funkciis. Inter alie la sukceso de la 7-a Universala Kongreso (1911), organizita en Antverpeno en konsento kun la nacia ligo kiun li iam prezidis, pruvis tion. En 1912 li eĉ devis haltigi "Belga Sonorilo" pro manko de legantoj. Malfeliĉa pro perditaj amikaj rilatoj en la movado por internacia lingvo kaj pro la maljusta sorto suferata pro kapricaj situacioj en Belgio, Lemaire - sola en kamparo, sen familio, suferante la mizeron de la unua mondmilito - dediĉis sin al aliaj interesoj. Post la milito li evitis kontaktojn kun la movadoj por Esperanto kaj Ido. En siaj lastaj vivjaroj li estis direktoro de la Kolonia Altlernejo en Antverpeno, establita je lia iniciato. Li mortis en Bruselo la 21-an de januaro 1926. Jen kiel la Esperanto-afero tro frue perdis tre valoran homon, kies pluajn kontribuojn ni povas nur imagi. Fakte, Charles Lemaire estas apostato de sama grandio kiel la pli konata Kabe.

Wim De Smet verkis, Marcel Delforge kolektis, Belgio



Foto de Kabe

La pseŭdonimo de **Kazimierz BEIN** (naskiĝis 1872, mortis en 1959 en Lodz, Pollando), okulkuracisto pola, krome leksikografo, tradukisto kaj dumtempe tre aktiva esperantisto. Li estis unu el la plej grandaj stilistoj dum la frua periodo de la Esperanto-literaturo.

Tradukisto: En siaj junaj jaroj li intermiksas en kontraŭrusan movadon, pro kio li estis ekzilita por pluraj jaroj. Tial nur en 1899 li finis la medicinan fakultaton en Kazan. Li verkis multajn prifakajn librojn kaj artikolojn kaj fondis la Polan Oftalmologian Societon. Li estis konata ankaŭ kiel amatora foto-artisto. En la esperanta mondo li famiĝis, sub la pseŭdonimo Kabe, per la traduko de la *Fundo de l' Mizero* de Sieroszewski, kiu aperis en *Lingvo Internacia* en 1904. Ekde 1906 li estis vicprezidanto de la Akademio. Kabe estis dum kelkaj jaroj la plej elstara Esperanto-tradukisto. La du ĉefverkoj de Kabe estas: *Vortaro de Esperanto* (vortaro esperanta, en kiu la esperantajn vortojn li difinas en eleganta maniero) kaj la traduko de *La Faraono*, romano de Boleslaw Prus. La granda merito de Kabe estas lia influo rilate al la evoluo de la esperanta prozo-stilo. Lia lingvaĵo estas pura klara, simpla, vere eleganta, libera de ĉiu naciismo: la *spirito de la lingvo* vivas en lia stilo plenspire kaj sendifekte. Liaj frazoj estas perfekte ekvilibritaj, ĉiu vorto sur sia ĝusta loko. Mankas ĉiu nenecesa komplikaĵo aŭ trologikaĵo; ekz. li preskaŭ ĉiam evitas la kompleksajn verboformojn (estas -inta, estis -anta). Li skribas vere internacian Esperanton, lingvon aĝrable glatan, lude legeblan. Li mem klarigas tion, en la supre nomita intervjuo, per sia plurlingveco, laŭ li: *por havi bonan stilon nepre estas necese koni minimume tri diversajn lingvojn*. Ĉi tio nepre estis vera por la unua periodo de la lingvo, kiam Esperanto ne havis ankoraŭ propran spiriton kaj oni ĝin devis krei, sed ĝi pli kaj pli perdas sian

7
signifon per la iom-post-ioma kompletiĝo kaj memstariĝo de la lingvo. Originale li ne verkis. Laŭ lia opinio, *la lingvo profitas pli multe per la tradukado, ol per libera originala verkado. La originala verkisto ĉiam iel povos eltiri sin, li simple ne uzos malfacilajn esprimojn aŭ simple donos aliajn anstataŭ ili*. Same prava opinio; sed aliflanke la lingvo certe bezonas ankaŭ originalajn verkistojn kiuj, eĉ se ili malpli evoluigos la lingvon mem, uzos kaj per tio sankcios kaj fikso la profiton akiritan de la tradukistoj.

Kabe kabeis: En 1911 Kabe subite malaperis el la movado, sen komento pri la kialoj. Li rezignis pri Esperanto-kariero kaj anstataŭe fariĝis direktoro de la Varsovia Oftalmologia Instituto. De tiam li tute ne okupiĝis plu pri Esperanto. La motivoj de ĉi tiu decido estas ankoraŭ neklaraj, verŝajne kontribuis en tio ankaŭ personaj kaŭzoj (malpaciĝo kun Antoni Grabowski, Adam Zakrzewski kaj aliaj), sed aliparte estas nekomprenoble, ke lokaj kaŭzoj difinu ies sintenon al tia vaste internacia afero, kia estas Esperanto. Intervjuate en 1931 (*Literatura Mondo*, paĝo 144), li parolis pri neprogreso de Esperanto, kiun li ne rigardis solvo de la internacia lingvo. Laŭ tio ĉi, do lian "Grandan Rezignon" motivus principaj konsideroj. Kia ajn estis la kaŭzo de lia retiriĝo, la esperantistaron vigle okupis ĉi tiu neordinara sinteno, ke iu, ĉe la kulmino de sia esperantista gloro, riĉiginte la lingvon per gravaj laboroj kaj eksterordinara influo, subite, en siaj junaj jaroj, turnas por ĉiam la dorson al la kampoj de siaj riĉaj rikoltoj. Lia nomo fariĝis kvazaŭ la simbolo de apostateco, aŭdante pri "kabeoj", la esperantistoj scias, pri kiuj temas. El lia pseŭdonimo estiĝis Esperanta verbo kabej, kio signifas *estinte aktivulo forlasi la Esperanto-movadon*. Ankaŭ **kabeigi** estas ofte aŭdata varianto. Vikipedio

KABE (KAZIMIERZ BEIN)

Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,
Droninta vive en la morto,
Kia mister-malica forto
Vin povis de ni preni rabe?
Ni lernis de vi lernantknabe
Kuiro en la stilretorto.
Ho, Kabe, Kabe, Kabe, Kabe,
Droninta vive en la morto!

Kaj nun ni miras gape, strabe
Pri via karier-aborto.
Al vi la esperanta vorto
Nun eble sonas jam arabe...
Ho Kabe, Kabe, Kabe, Kabe.

K. Kalocsay, *Rimportretoj*, 1931

ĈU ŜI AMAS AŬ NE AMAS?!

Foje mi renkontis nokte sur Luterana Placo mian amikon Karlo. Kun alte levita kapo li strange, senorde vagis tie. Li kuris zigzage, haltis, iris flanken, malantaŭen, marŝis sur la herbo kaj tuŝegis la junajn arbojn. Ŝajnis al mi, ke li havas sekiĝintajn lipojn kaj malsane ruĝajn vangojn.

Li ne tuj rekonis min kaj komencis paroli kun febra rapido:

"Vi ridas? Mi scias, ke vi trovas min freneza. Tamen mi ne ŝanĝus mian frenezon por via filozofa trankvilo. Indiferentaj estas por mi viaj grandaj demandoj!... La amo - jen estas demando..."

"Ĉu vi atendas iun?"

"Komprenoble!" respondis li per senbezone aroganta voĉo. "Ĉu vi pensas, ke mi tion malĉefos? Tute ne. Mi eĉ diros al vi, ke mi pasigas ĉi tie tutajn vesperojn kaj mi estas feliĉa, se post semajna vagado mi renkontos kaj rigardos ŝin -- nur dum kelke da minutoj."

"Tio estas en ĉiu okazo iom unutona."

"Mi tion diversigas: iafoje mi pensas, ke ŝi jam amas min, iafoje mi divenas, ĉu ŝi min amas? Aŭ mi aranĝas ludon por antaŭvidi la sorton kaj irante de unu rando de l' placo al la alia mi kalkulas la paŝojn: 'Ŝi amas' -- 'Ŝi ne amas' - 'Ŝi amas' - 'Ŝi ne amas' ... Sed hodiaŭ mi elpensis ludon pli konvenan por mi. Mi elektas sur la ĉielo stelon kaj poste sur la placo mi serĉas punkton, de kiu mi povus vidi ĝin ĝuste super la pinto de l' preĝeja kupolo. Se mi tuj trovas tian punkton, kaj mia stelo ekbrilas super la kruco, tio ĉi signifas: 'Ŝi amas'..."

"Ĉu vi ofte trafas?"

"Sufiĉe ... kaj tio neesprimeble ĝojigas min."

"Bonan nokton!" mi diris.

"Ho!" murmuretis li, tirante mian manon, "vin mirigas, ke ekzistas homo, kiu kuraĝas laŭte diri, ke li amas kaj kiel li amas..."

Foririnte dekkelke da paŝoj, mi haltis ĉe la trotuaro, kaj mia amiko ree komencis sian ludon, ŝanceliĝante kvazaŭ ebria.

Sur la kurbigo de l' vojeto, preter la enamiĝinto, du ombroj pasis. La paro kaj la soluĝo ne rimarkis unu la alian, ĉar li seninterrompe observis la stelojn, kaj ili vive parolis. Ili iris brakon ĉe brako, malrapide kaj tiel proksime unu ĉe l' alia, ke ili formis kvazaŭ unu estaĵon. La virino klinis la kapon al la ŝultro de l' viro, kaj li - ŝajnis al mi - premis ŝian maneton.

Kiam ili proksimiĝis al la trotuaro, la lumo de la lanterno falis sur ilin. La virino estis ŝi, la viro -- alia mia amiko Jozefo.

Ili rapide salutis min por plej baldaŭ liberiĝi de mi. Nur ŝi nerve premis mian manon kaj,

fiksante sian rigardon sur miaj okulvitroj, diris mallaŭte:

"Mi esperas, ke Karlo ne aŭdos pri tio eĉ unu vorton..."

Kaj ili foriris, sed ŝi ankoraŭ unu fojon rigardis min minace kaj aldonis per voĉo, kiu similis la murmureton de kolombaj flugiloj:

"Alie mi estos tre kolera!"

Mi estas certa, ke en tiu ĉi momento mia amiko Karlo vidis la stelon ĝuste super la kupola pinto... Boleslaw Prus, elpoligis KABE

La Kirurgo veturis per Homa Graso

Ne estas etaj ŝparaĵoj, eĉ kiam oni estas plastika kirurgo en Beverly Hills. Trans atlantiko, je la horo kiam senpolue veturi estas (preskaŭ) tiom populara kiom uzi plastikan kirurgion, la klinikisto Alan Bittner ŝajnis esti trovinta la solvon : Por sia 4x4, li uzas biokarburadon surbaze de grasaj forĵetaĵoj kiujn li rekolektis de la liposukcioj realigitaj sur siaj gepacientoj. Farado ja mirinda, sed ĉefe kontraŭleĝa.

Kiam la realo superas la fikcion. La scenaristoj de la televida dramserio Nip/tuck (du estetikaj kirurgoj kiuj ĵonglas inter siaj gepacientoj en la privata kliniko de Miami kaj sia tumulta intima vivo) tie tenas eblan inspiron por venonta epizodo de la distraĵo: La estetika kirurgo Alan Bittner kiu operaciis en unu el pli luksaj avenuoj de Los-Anĝeleso, Rodeo Drive, reutiligis la grason eliritan dum liposukcioj kaj recikligis ĝin por movigi sian aŭton kaj ankaŭ tiun de sia edzino.

Se la viro ŝajnas persvadita de la praveco de sia agmaniero pri la vivmedio (li klarigas ĉe la paĝaro <http://www.lipodiesel.org> ke la pacientoj feliĉas scii ke ilia graso tuj konos utilan estontecon), li frue estis rekaptita de la leĝo. Tiu kiu eksplikas ĉe sia paĝaro ke "unu litro da graso praktike samvaloras ol unu litro da biokarburado" kaj permesas al li "traveturi la saman distancon ol kun ordinara dizelo", devis do ĉesigi siajn agadojn. Ĉar uzado de medicinaj rubaĵoj estas malpermesita de la leĝo, la sanitariaj servoj de Kalifornio traserĉis lian klinikon. Oni-dire, la viro forflugis al Kolombio kie li establis novan privatan klinikon Elfrancigis Lucien Michaux



Lucien Michaux



Alan Bittner

ALTERNATIVOJ

Junecon mian oni vokis al batalo por la socio, kie regos justa bono. Prudentaj vortoj - mia sola kapitalo - en poŝo tintis gaje apud kupra mono. Mi terurigiĝis tiam pro la vort' "filistro", kaj enkaptis el la kantoj mi kun ĝojo: -Alternativo de laboro - fia distro, alternativo de kanapo - glora vojo.

Sed ial mi ne ŝatis pensi ordinare draŝita estis ofte pro demandoj miaj, ĉar ne komprenis, do ne povis trakti klare la tezojn, kiuj tute klaris por aliaj. Instruis min en mia stulta malkvieto singulto tima aŭ ĝojiga vodka gluto: - Alternativo de postulo estas peto, alternativo de parolo estas mutio.

Mi min ekzilis en la nordan regionon, kun nuraj du koloroj laŭ natura leĝo: Kolor' de karbo nun provizis mian bonon, kaj trunkviligis koron la kolor' de neĝo. Mi nigrablanke kutimiĝis al realo, certigis min la plej fidinda terprofundo: - Alternativo de ascendo estas falo, alternativo de frakaso estas vundo.

Ruliĝis radoj de l'senbrida vivoĉaro, juneco pasis, tamen restis miaj duboj. Kaj mian vojon pliĝustigis nova caro, kaj mian nomon gaje ŝtelis novaj buboj. Iaman veron oni nomis nun misvago, proklamis laŭte dum faligo de l'idolo: - Alternativo de riĉeco estas blago, alternativo de komerco estas folo.

Mi devigite tiam plonĝis en komercon, sen scio trompi, do kun certa malprofito, la troimpostojn akceptante kiel ŝercon, kiel nepraĵon la postulojn de bandito. Konatojn miajn distancigis trompa vendo, amikoj koraj min edifis kun sincero: - Alternativo de pereco estas venko, alternativo de mensogo estas vero.

Malico koron ne obsedis, nur la duboj min rodas ĉe la ŝanĝoj en nuntempa stato, kaj horizonton same kovras novaj duboj, kaj eĉ pli premas la problemoj de l' estado. Kaj retiriĝas honestec' al certaj limoj, prudentan movon anstataŭas stulta drivo. Mi vican fojon vidas vanon de l' viktimoj, kaj ne videblas antaŭ mi alternativo. Miŝa Bronŝtejn, Tihvin, S.Petroburgo, Rusujo

MI HAVAS SOIFON DE VI

Sur travedebla rivero de akvo kiel spegulo tute klara, sen nebulo; mi vidis, ekde la tero, ke, tie eŝtis l' apero de via vizaĝo bela, sur la akv-ebeno hela reflektita en la fluo de la vitra akvo-blua kiel radi-brilo stela.

Profundiĝas en l'rivero l' soifanta buŝo mia por kunesti kun la via en la spegulo-mistero... ...sed fandiĝas la apero, en la supraĝa kristalo, pro la miraĝo-fatalo, ĉe ĉio estis malvero.

Ĉar kiam mia ektuŝo iras al viaj labioj, en la akvoj-idilioj, malaperas via buŝo.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

FERNÃO DE MAGALHÃES*

En valo ekklariĝas la fajreto. La tutan teron danco vibre skuas. Kaj ombroj dismalordaj kaj misformaj el la val' en ekflamoj nigraj iras, subite al deklivoj iĝas disaj, ĝis ili forperdiĝas en mallumon.

Kiuj dancas la nokton terurante? 'Stas la Titanoj, la filoj el l' Tero. Ili dancas pri l' morto de l' maristo, kiun la teran panjon volis zoni. Li el homar' l' unua tion faris, kaj nun sepulta 'stas en fora plaĝo.

Ili dancas sence, ke l' animo de l' kuraĝulo plu gvidas l' armeon, senkorpa pulso ĉe l' kudro gvidanta la navojn en la roman spacan foron: eĉ malestanta, li sciis ĉirkaŭi la tutan teron per sia brakumo.

Li perfortis la Teron. Sed ne scias pri tio ili, kaj dancas solece; kiuj en horizontojn forperdiĝos, disgrimpas el la val' al la deklivoj de l' mutaj montoj.

Fernando Pessoa, tradukis João José Santos

* Fernão de Magalhães estis la unua ŝipa kapitano kiu ĉirkaŭiris la Teron tra la maro, atestante ĝia rondeco, kaj malkovrante la pasejo nomita laŭ lia nomo, de Atlantika al Pacifika Oceano sub la Amerika kontinento. Li mortis en 1521 batalante en Filipina insularo. Literatura reta revuo "La Karavelo", Estremoz, Portugalujo

REKOMENDO PRI LA REFLEKSIVO

En Majo 1971, sekve de raporto de la Direktoro pri la Gramatika Sekcio, D.B. Gregor, la Akademio de Esperanto, post zorga esplorado de la demando, oficialigis unuanime jenan regulon pri refleksivaj pronomoj kaj adjektivoj; ĝi esperas per tio pozitive kontribui al pli granda unueco de uzado.

Regulo:

I. La refleksivaj pronomoj (serio "si/sia") rilatas nur la 3-an personon kaj resendas al la plej proksima subjekto, aŭ singulara aŭ plurala. Tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo, ĉar novan subjekton povas enkonduki (1) infinitivo, (2) a-finaĵa participo kaj (3) substantivo de verba deveno, kiam ĝi klare esprimas agon.

II. Iafaĵe la vera subjekto lasas sin vidi per enmeto de la vortoj "kiu(j) est-" ekz-e ĉe apozicioj adjektivaj aŭ substantivaj provizitaj per komplemento (ekz-e: "kastelo fama pro sia historio" — sed "li ekvidis sian fraton Benjaminon, la filon de lia patrino" t.e. Benjaminon, kiu estis la filo de lia patrino).

III. Ekzistas tradicie sankciitaj vortkunmetoj kaj frazeroj, en kiuj la refleksivo funkcias absolute, sen rilato al la agsubjekto, ekz-e "siatempe" ktp.

IV. Nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata.

Gvidaj ekzemploj:

I a. Vi lavas vin kaj li lavas sin.

Ĉiuj homoj akiras por si.

Ŝi estas amata por si, ne por la dot.

Sia propra patrino forpelis ŝin de si.

Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem.

Mia patrino plendas, ke ŝiaj filinoj faras ĉion por si, nenion por ŝi.

I b. Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro.

La infanoj serĉis sian patrinon.

Ŝi estas amata de siaj instruistinoj.

Li promenis kun sia edzino; li kaj lia edzino promenis.

Ili kondukis la kolegojn en sian loĝejon anstataŭ iri kun ili en ilian.

La patrino diras, ke ŝia filino venos kun sia infano.

I (1). La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin por la ceremonio.

La sinjoro ordonis al la servisto vesti sin pli dece.

La mizerulo kutimiĝis lin levi sin el la lito tre frue.

Jozefo ordonis al siaj servistoj balzami lian patron.

Li invitis la pentriston alporti unu el siaj pentraĵoj.

La reĝo, konsultinte kun la ĉefministro, sendis voki sian kuraciston.

I (2). Ŝi ekvidis viron staranta antaŭ ŝi.

Ŝi ekvidis starantan viron antaŭ si.

Li sidigis sur la seĝo prezentita al li.

Li portis seĝeton refalditan sur si mem.

Li estos kiel arbo donanta sian frukton en sia tempo.

Li rekomencis la soldatojn batalintajn por lia savo.

La pastro sentis la pekulon tuŝita de liaj admonoj. La juĝisto opiniis la atestanton influata de siaj antaŭjuĝoj.

I (3). Marta admiris lian fidon al ŝi (al M.).

Marta admiris lian fidon al si.

Ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj.

Ŝi ribelis kontraŭ la interveno de edzo en ŝiajn aferojn.

Ŝi zorge observis la enportadon de siaj kofroj.

II. Li evitu la trinkaĵojn por li tro acidajn.

Ĉiu konas homojn nur por si indulĝajn.

Picasso vizitis muzeon, faman pro liaj pentraĵoj.

Ili vizitis la muzeon faman pro siaj pentraĵoj.

III. Moki ies fidon al si mem.

Oni komprenis liajn gestojn per si mem.

Ni ne povas koni la realon en si mem.

Metu ĉion en sian lokon.

En ĉiu kranio estas sia opinio.

Konsulto

Post kiam la Akademio de Esperanto oficialigis kaj publikigis la regulon pri la refleksivoj, venis kelkaj leteroj, demandantaj pri tiu aŭ alia detala punkto.

La uzo de la refleksivo estas kompleksa afero, kaj eble tial ĝi neniam estis ĝis nun formulita en regulo; ĝi postulas de la uzanto apartan decidon en ĉiu okazo, nome ĉu la efikanta radiko havas la karakteron de ago kaj kiu estas la (gramatika) subjekto de tiu ago. La decidoj povas variu laŭ la speco de la radiko, laŭ la kunteksto kaj fine laŭ intenco aŭ lingvokutimoj de la uzanto. Tio klarigas, kial la Akademio provis ja difini la gvidliniojn de la uzado, sed respekti samtempe la liberecon de interpretado pri dubaj okazoj.

Praktike, la plimulto el la Akademianoj opinias:

1) ke oni devas konsideri la subjekton de infinitivo, participo aŭ substantivo nur, se ĝi estas esprimita. Tion klarigas la ekzemplo sub I(1): "La reĝo sendis voki sian kuraciston" (same estus pri la samvaloraj "La reĝo venigis sian kuraciston" aŭ "la abatino lernigis al ŝi ŝian novican preĝon").

2) ke la ceteraj substantivoj montrantaj personojn ne estas konsiderendaj por la uzo aŭ neuzo de la refleksivo; "servanto" estas traktenda kiel "sklavo", "instruisto" kiel "profesoro", aŭ "flatulo" kiel "kortegano".

3) ke la ceteraj verberaj substantivoj ofte povas montri egale aŭ la agon aŭ rezulton de la ago, tiel ke la decidon devas fari la intenco de la uzanto. La du lastaj ekzemploj sub I(3) ilustras la unuan eblon, ĉar ĝi estas ĝis nun la pli ofte renkontata: "Ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj" kaj "Ŝi ribelis kontraŭ la interveno de (la) edzo en ŝiajn aferojn". Sed en ambaŭ frazoj, se oni komprenus "flatado" kvazaŭ "komplimento" kaj "interveno" kvazaŭ "enketo" aŭ "operacio", oni tute bone povus uzi "sia".

Pri la substantiva predikativo estas ankoraŭ tro frue por difini la uzadon, kiu hezitas inter la Zamenhofa "La Eternulo bonvolis fari vin Lia popolo" kaj la pli moderna "La reĝo faris lin sia ministro". Estas cetere facile eviti la heziton, skribante: "La reĝo faris el li sian ministron".

1971 - Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto - No. 10

AKADEMIO DE ESPERANTO

La Akademio de Esperanto estas sendependa lingva institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon, same kiel la ceteraj nacilingvaj Akademioj. Oni ne konfuzu ĝin kun la Akademio Literatura de Esperanto (ALE). La Akademio de Esperanto estis fondita en 1905 dum la unua Universala Kongreso de Esperanto, laŭ propono de Ludwik Lejzer Zamenhof, sed tiam sub la nomo "Lingva Komitato". La nomon "Akademio de Esperanto" portis unue supera komisiono de la Lingva Komitato. En 1948 la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio kunfandiĝis en unu solan korpon nomatan "Akademio de Esperanto". La Akademio enhavas Sekciojn, kiuj prizorgas diversajn lingvajn kampojn de la Akademia laboro. La Sekcioj ne estas fiksitaj, sed estas kreataj laŭbezone. Ĉiun Sekcion gvidas Direktoro. Ĉiu Akademiano povas aparteni al pluraj Sekcioj, laŭ sia intereso. Ekzistas jenaj Sekcioj: Faka Lingvo, Gramatiko, Generala Vortaro, Literaturo, Prononco, Kontrolado de lerniloj kaj Konsultejo. La Akademio ankaŭ havas Komisionojn, kiuj plenumas diversajn ne-lingvajn taskojn. Ĉiu Komisiono estas gvidata de Direktoro. En Septembro 2007 ekzistis nur unu Komisiono: Historio de la Akademio de Esperanto. La Akademio de Esperanto en 1999 starigis komisionon Konsultejo de la Akademio, al kiu povas turni sin ĉiu Esperanto-uzanto por difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. La Akademio konsistas el 45 membroj, kiuj estas nomumitaj por periodo de 9 jaroj. Nova membro devas esti proponita de almenaŭ kvin ekzistantaj Akademianoj. Kutime temas pri renomaj esperantologoj, Esperanto-pedagogoj aŭ verkistoj. Eminentaj personoj povas esti nomumitaj "korespondanta membron" de la Akademio.

Prezidantoj de Akademio estis:

Johannes R.C. ISBRUCKER (Nederlando, 1948-1963), **Gaston WARINGHIEN** (Francio, 1963-1979), **William AULD** (Britio, 1979-1983), **André ALBAULT** (Francio 1983-1995), **Werner BORMANN** (Germanio, 1995-1998), **Geraldo MATTOS** (Brazilo 1998-2007), **Jonh WELLS** (Britio, 2007-).

Je la 14 de Septembro de 2007, 42 akademianoj voĉdonis por elekti la estraron kaj la direktorojn de la Sekcioj kaj Komisionoj de la Akademio de Esperanto.

Estraro: La estraro de la Akademio de Esperanto konsistas (de septembro 2007) el:

John Wells, prezidanto, Brian Moon, vicprezidanto, Probal Dasgupta, vicprezidanto, Renato Corsetti, sekretario.

Nuna konsisto (alfabetordigata laŭ familia nomo):

Perla Ari-Martinelli, Aŝvinikumar, Marc Bavant, Gersi Alfredo Bays, Vilmos Benczik, Gerrit Berveling, Marjorie Boulton, André Cherpillod, Renato Corsetti, Dao Anh Kha, Probal Dasgupta, Michel Duc-Goninaz, Gbeglo Koffi, Paul Gubbins, Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek), Ottó Haszpra, Christer Kiselman, Boris Kolker, Koutny Ilona, Katalin Kováts, Erich-Dieter Krause, Mauro La Torre, Jouko Lindstedt, Li Shijun, François Lo Jacomo, Anna Löwenstein, Ma Young-tae, Carmel Mallia, Geraldo Mattos, Carlo Minnaja, Brian Moon,

11

Barbara Pietrzak, Sergej B. Pokrovskij, Otto Prytz, Baldur Ragnarsson, Flavio Rebelo, Saka Tadasi, Francisko Simonnet, Trevor Steele, Humphrey R. Tonkin, Amri Wandel, John C. Wells, Bertilo Wennergren, Xie Yuming, Yamasaki Seikō.

En aprilo 2007 finiĝis la elekto de triono de la membroj de la Akademio. La membroj elektitaj estas:

Nove elektitaj:

Paul Gubbins, Katalin Kováts, Mauro La Torre, Ma Young-tae, Barbara Pietrzak, Saka Tadasi.

Reelektitaj:

Gerrit Berveling, Renato Corsetti, Christer Kiselman, Ilona Koutny, Jouko Lindstedt, François Lo Jacomo, Geraldo Mattos, Brian Moon, Baldur Ragnarsson.

Kiel direktoroj de sekcioj estis elektitaj:

Marc Bavant, Faka Lingvo; Jouko Lindstedt, Gramatiko; Bertilo Wennergren, Generala Vortaro ; Marc Bavant, Kontrolado de lerniloj; Boris Kolker, Lingva Konsultejo; Humphrey Tonkin, Literaturo; Probal Dasgupta, Prononco; Carlo Minnaja, Komisiono Historio de AdE.

<http://eo.wikipedia.org/>

ERAROJ DE LA AKADEMIANOJ: Gravetaj, gravaj kaj gravegaj

I. La Lingva Komitato difinas en 1921 la vorton *nekrologo* kiel artikolon pri vivo kaj agoj de mortinto, pro la germana kaj pola. Charles Verax [Enciklopedia Vortareto Esperanta, p. 166. Paris: Hachette, 1910. 249 p.] oponas: *Nekrologo, nécrologue*, verkanto de nekrologioj. Kaj tio okazas sub Cart, kiu antaŭparolis al la Vortaro Franca-Esperanto [Paris: Presa Esperantista Societo, 1908. 665 p.l., kies verkintoj ree oponas al lia estonta decido en la p. 454: *Nécrologie, nekrologio, Nécrologue, nekrologo*. Tiam decidon kontraŭas pli ol kvindek da grekdevenaj istovortoj, al kiuj ĉiam respondas po unu studovorto, kaj mi ekzemplas per la vortoj *antropologo* [sciencisto] kaj *antropologio* [scienco]. La listo estas pli longa ol la nun prezentata: Antropologo, arkeologo, astrologo, biologo, citologo, dermatologo, egiptologo, entomologo, esperantologo, etologo, etimologo, etiologo, etnologo, filologo, fiziologo, fotologo, frenologo, genealogo, ginekologo, geologo, grafologo, grundologo, hagiologo, hematologo, hidrologo, iktiologo, kardiologo, kosmologo, laringologo, meteorologo, mineralogo [kun haplogio], mitologo, *nekrologo*, nematodologo, ornitologo, otologo, paleologo, paleontologo, patologo, pedologo, plantologo, pneŭmonologo, psikologo, seismologo, semiologo, sociologo, stomatologo, teatrologo, teologo, urologo, vinologo, zoologo.

II. La granda prestiĝo de la Akademio de Esperanto en la sesdekaj jaroj influis la akcepton de la falsaj ekvacioj proponitaj de prezidanto J. R. G. Isbrücker en cirkulero disdonita dum la publika kunsido okaze de la 45-a UK de Bruselo en 1960:

-anta -inta -onta

///
kiu -as kiu -is kiu -os

-ata -ita -ota

///

kiun (kion) oni -as

kiun (kion) oni -is

kiun (kion) oni -os

12

Ekzemploj pravas, ke ili estas plene eraraj:

Mi rigardas al homo kantanta.

Mi rigardis al homo kantanta.

Mi rigardos al homo kantanta.

Min ravas la himno kantata de li.

Min ravis la himno kantata de li.

Min ravos la himno kantata de li.

Enirinte, li sidigās.

Enirinte, li sidigīs.

Enirinte, li sidigōs.

///

Mi rigardas al homo, kiu kantas.

Mi rigardis al homo, kiu kantis.

Mi rigardos al homo, kiu kantis.

Min ravis la himno, kiun li kantis.

Min ravos la himno, kiun li kantis.

Post kiam li eniras, li sidigās.

Post kiam li eniris, li sidigīs.

Post kiam li eniros, li sidigōs.

Pri la estantaj kaj estintaj pasivaj participoj, mi nun ekzemplas per mia nuna malsano: post nelonge mi estos paciento de kirurgo.... Pri mi mem mi povas nun diri: - Nun mi devas esti operaciata. Kiam mi estos operaciata, kirurgo, anesteziisto kaj flegistinoj ĉirkaŭos min. Kiam mi estos operaciata, mi reiros hejmen.

III. Inter 1965.02.03 kaj 1967.11.23 la participoj dividis la akademianojn en du grupojn sub Gaston Waringhien (1963-1979), kaj nur manovro ebligis fini tiun diskuton; analizi la sencojn de kvar frazoj senditaj de kvar Esperantaj organizaĵoj. Li venkis, eĉ kun la voĉo de Carlos Domingues, unu el la prezidantoj de BEL, sed tia triumfo donis nenian regulojn por la uzado de niaj participoj, precipe se ni konsideras, ke unu el la kvar frazoj prezentas participon, kiu havas nur pure adjektivan funkcion, sekve sen ia referenco al aktiva verboformo kaj sen ebleco de kohera respondo [la 2-a frazo], kaj alia estas ambigua ekster kunteksto [la 4-a frazo], kvankam la plej ofta estas la unua, kiu ne tre ĝentile ĉiam indikis itistan opinion. Nur unu el la akademianoj vidis en la participoj la samajn regulojn kiel mi mem: A. Rudolf Haferkorn (1896-1988), kies voĉdonon mi ripetis, la sola Koperniko inter multaj Ptolemeoj... La frazoj estis faritaj de *Union Française pour l'Espéranto*, submetitaj al la decido de *Esperanto Vereinigung Deutscher Lehrer* kaj senditaj al la Akademio de Esperanto por fina solvo. Krome, *Deutscher Esperanto-Bund* kaj Universala Esperanto-Asocio petis, ke la Akademio de Esperanto esploru kaj solvu la problemon de la pasivaj participoj. Tiuj frazoj devigas la leganton al la dedukto de reguloj, kiuj estas tre malfacilaj pro la negranda teksto sen lingvaj cirkonstancoj, cetero kun participaj mistraĵoj.

Testofrazoj:

1 - "Ni garantias, ke la domoj detruitaj dum la milito estos rekonstruataj en 1970." = Do la garantiantoj estos kvitaj,

a) se en la daŭro de 1970 oni komencos kaj daŭrigos la rekonstruadon de la domoj detruitaj....

b) Nur se en la daŭro de 1970 oni finos la rekonstruadon.

2 - "Mi promesas, ke mia ŝuldo estos pagita la 9-an de Majo." =

a) la ŝuldanto senŝuldiĝos la 9-an de Majo;

b) la ŝuldanto senŝuldiĝos plej malfrue la 8-an de Majo.

3 - "Ni asertas, ke la aŭtomobilo de s-ro X estis efektive riparata la lastan semajnon." =

a) la lastan semajnon oni efektive okupiĝis pri la riparado de la aŭtomobilo;

b) la lastan semajnon oni efektive finis la riparadon de la aŭtomobilo.

4 - "Via propono estis unuanime akceptita la 3-an de Junio." =

a) oni akceptis la proponon la 3-an de Junio;

b) oni akceptis la proponon antaŭ la 3-a de Junio.

IV. La konstanta penado de prezidanto Albault estis fruktodona laboro, sed permesis kelkajn facilanimajn decidojn kaj asertojn [miaj rektaj krampoj]:

-nulgilo de la antaŭa decido de la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio kontraŭ la latina sufikso *-io*. Aktoj II, p. 12 kaj 19.

-tolero de *un'*: nenio en la Statuto parolas pri tolero... Aktoj II p. 31

-oficialigo de la numeralo *nul*. Aktoj II p. 34.

-Unu arbitra [-ujo], la alia internacia [-io]: simple oportunitigita formo de la slava finaĵo -ija. Aktoj III

-konfuzo inter la greka kaj la latina finaĵoj *-io*: zoologio / Bolivio. Aktoj III

-Permeso uzi la internacian latinan landsufikson antaŭ la Fundamenta:

Tiel same ni proponas, ke la normoj enprenu en egaleco la sufiksojn -ujo kaj -io [...] nur en la okazoj, en kiuj oni povas libere interŝanĝi ilin (Ekz-e, Anglujo / Anglio, sed nur Bolivio)

. Aktoj III.

Geraldo Mattos Gomes dos Santos,
eksa prezidanto de la Akademio de Esperanto (ĝis 2007)

ESPERANTO EN BRAZILO

Brazilia senatano proponas oficialigi Esperanton en la brazila mezlernejo. La projekto ricevis pozitivan priskribon de la senato.

Cristovam Buarque, elstara brazila senatano, proponis la oficialan enkondukon de Esperanto en la brazila mezlernejo. La projekto ricevis pozitivan akcepton kaj eĉ laŭdon de la Komisiono pri Edukado de la supera ĉambro. Senatano Marcelo Crivela (fama evangeliisto en Brazilo), kiu estras tiun komisionon de la brazila senato, redaktis favoran priskribon al la iniciato de Cristovam Buarque.

La leĝa projekto ne vekis polemikon kaj glate trakuris la etapojn laŭ la interna regularo de la brazila senato. Post la voĉdonado de la senatanoj

ĝi estos sendita al la ĉambro de la deputitoj por nova voĉdonado. Kun la akcepto de la deputitoj, la brazila respublikestro certe ne hezitos pri la sankcio kaj subskribos ĝin. Antaŭ unu jaro, per la Leĝa Projekto n-ro 27/2008, Cristovam Buarque proponis ŝanĝon de la artikolo 26-a de la Leĝon n-ro 9.394, de la 20-a de decembro 1996, la plej grava ĉe la brazila leĝaro pri edukado (portugallingve LDB - Lei de Diretrizes e Bases da Educação).

Laŭ la 26-a artikolo de tiu leĝo la lerneja komunumo rajtas elekti fremdan lingvon kaj responde la koncerna lernejo devas plenumi tiun postulon. Ekzemple se lerneja komunumo elektos Esperanton, la lernejestraro prizorgos pri ties instruado. Se jam eblas elekti Esperanton aŭ alian lingvon en la brazila lernejo, ĉu baza, ĉu meza, oni povas demandi, kion validas la iniciato de la senatano, kiu celas la mezlernejon. Nu la fakto, ke Esperanto aperos en la teksto de la leĝo tre gravas laŭ politika vidpunkto, eĉ pro tio, ke Esperanto estos la ununura "fremda" lingvo en la ĉefa regularo pri edukado en Brazilo, danke al la aldono de la 6-a alineo al la menciita 26-a artikolo. Indas sciigi, ke la laŭdindan iniciaton, certe la plej gravan de la historio de Esperanto en Brazilo, proponis ne-esperantisto.

Cristovam Buarque, eks-rektoro de la Universitato de Brazilo kaj eks-kandidato al respublikestro, bedaŭrinde ne parolas Esperanton. Kvankam ekstermovade, li brile lernis kaj flue parolas la internan ideon proponitan de Zamenhof. En la teksto de la leĝa projekto Esperanto estas vidata de la senatano kiel taŭga ilo por la konstruado de la paca kulturo ne nur internacie sed ankaŭ enlande. En la jubilea 150-a jariĝo de Zamenhof brazila movado ricevas tiun leĝan donacon kun ĝojo. Nun ni rapidu lerni, kiel elpaki ĝin. La Leĝa Projekto troviĝas portugallingve en sekve menciata retejo.

http://www.senado.gov.br/sf/atividade/materia/detalhes.asp?p_cod_mate=83989
José Leite de Oliveira Júnior, Libera Folia



Cristovam Buarque, Brazila senatano

KRIZO KOMENCIĜAS ENE DE NIAJ KAPOJ

Iu simpla viro loĝis apud granda vojo kaj okupiĝis pri vendado de sandviĉoj. Li ne legis gazetojn, ne posedis radion aŭ televidon sed produktis kaj vendadis la plej bongustajn kaj bonkvalitajn sandviĉojn de la tuta regiono. Li ankaŭ okupiĝis pri reklamado de sia afero, pendigis vojsildojn kaj muranoncojn, ofertis sian produkton laŭtvoĉe kaj la popolo aĉetis, ŝatis, kontentiĝis kaj reaĉetis. Vendoj pligrandiĝis pli kaj pli kaj li plibonigis kvaliton, renovigis prezentadon, inventis ankoraŭ pli allogajn sandviĉojn. Li ankaŭ devis konstrui novan grandan fornon, aĉeti novajn kuirilojn kaj preparilojn por respondi al pli granda kvanto de aĉetantoj kaj afero prosperis kaj reprospiris. Liaj produktoj, pano, sandviĉoj estis la plej bongustaj kaj plej bonkvalitaj.

Riĉiĝante li sukcesis pagi la plej bonan kaj multkoston lernejon por sia filo. La infano kreskis kaj iris studi ekonomikan sciencan en la plej fama universitato de la lando. Finfine la filo jam doktore diplomita pri ekonomiko, revenis hejmen kaj konstatis ke la patro daŭrigis sian ĉi-atempan vivmanieron, multe vendante, plezurigante klientojn, prosperante. Li decidis havi gravan konversacion kun sia patro: - Kara patro, ĉu vi tamen ne legas gazetojn? Ne aŭskultas radion? Ne rigardas televidon? Ne uzas interretan? Sciu ke nuntempe ekzistas granda ekonomia krizo en la tuta mondo. Situacio en nia lando danĝeras katastrofi. Ĉio evoluas malbone. Mondo riskas bankroti.

Aŭskultante la konsilojn de sia filo, doktoro pri ekonomiko el la plej bona universitato, filo kiu legas gazetojn, aŭskultas radion, rigardas televidon, uzas interretan, la patro konkludis ke filo povas nur pravi, nur eblas ke li pravas.

Timante la krizon la patro serĉis kaj ekaĉetis pli malmultkostajn panon kaj produktojn por siaj sandviĉoj, sed kompreneble la kvalito malboniĝis. Por ŝpari li ĉesis reklamadi, pendigi vojsildojn kaj muranoncojn. Deprimata pro la scio pri la krizo, li jam ne plu ofertis laŭtvoĉe siajn produktaĵojn. Konsekvence al tiaj agadoj, la vendoj ekmalgreskis kaj plimalkreskis ĝis neteneblaj niveloj kaj la afero de sandviĉvendado, kiu kreis gajnojn sufiĉajn eĉ por studi la filon en plej multkosta universitato, finfine bankrotis.

La patro, trista, tiam parolis al sia filo: - Vi pravis, filo, ni estas dronatajn en grandega krizo.

Al siaj amikoj, la sama patro komentis fiere: - Benita horo kiam mi studigis mian filon pri ekonomika scienco, li eĉ povis sukcese averti min pri la krizo!

Lernindaĵo de ĉi-tiu leciono: Tra mondo ĉiam multaj amaskomunikiloj vehiklas malbonajn novaĵojn, kaj se ni ne sufiĉe zorgos, tiuj novaĵoj povas forŝteli prosperon de niaj vivoj.

Brazila teksto de 1958, esperantigis P.B.

13

14

SUKCENO

Vi, kiu iras al Pollando aŭ ĉebaltaj landoj ekinteresiĝu pri SUKCCENO - fosilia rezino de pino, origine minerala de 50 miljonojn da jaroj. Dum mineralizado ĝi fariĝis kiel ŝtono. Ĝi konsistas ĉefe el karbono, hidrogeno, oksigeno kaj diversaj rezinoj. Sukceno kondensas kaj malŝarĝas negativajn energiojn, samtempe plifortigas nervan sistemon. Ĉakro de la gorĝo - ĝi kontraŭbatalas malvarmon, humidecon kaj ties malsanojn (gripo, kataro, gorĝdoloro). Protektas spiradvojojn, mildigas krizon de astmo kaj dentdolorojn. Ĝi donas energion kaj ĝojon, agas kontraŭ laceco, angoro, deprimado kaj migrenoj. Sukceno estas ŝtono, kiu varmigis energian sistemon kaj purigadas ĉiujn kanalojn de cirkulado. De tempo al tempo ĝi bezonas reŝarĝon: 1 glaso de akvo, 1 kulereto da salo kaj kiel eble lasi ĝin sur la tero kaj suno. Astrologia signo: Leono, Ĝemeloj, Virgulino. Oni festas 34 jarojn de geedziĝo. Atenton! Estas falsaj sukccenoj: sintetizaj rezinoj, plastikoj, fondita sukcceno, k.t.p.

Barbara Poterucha, Dumviva Membro de EBG



MALSATO KAJ ĜIA KAŬZO

La fama verkisto George Bernard Shaw renkontis dikan viron. La viro rigardis la maldikan Shaw kaj diris: "Mi rigardas vin kaj pensas, ke en Anglio estas malsato".

"Kaj mi rigardas vin kaj pensas, ke vi estas kaŭzo de la malsato".

AGADO DE ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

La kursoj de Esperanto plu funkcias ĉiusemajne. Laŭ programo, la 28an de Januaro Michael Cwik prezentis fotoĵojn kaj lumbildaj diapozitivoj pri Universalaj Kongresoj. La 4an de Februaro Marcel Delforge prelegis pri la unuaj paŝoj de Esperanto en Belgio. La 11an de Februaro Marek Blahuš prelegis pri Ĉeĥio. La 18 de Februaro Barbara Poterucha prelegis pri historiaj skizoj el Pollando, La 25a de Februaro Georgia Henningsen prelegis pri Chopin. La programo de Marto havas prelegojn de Katarzyna Kuszke, Pinto de Sousa, Bernard-Regis Larue kaj André Demarque.



2009-02-04 - Kurso gvidata de Françoise Pellegnin (stara kun kaliko), lernantoj sidas dekstre maldekstre Muriel Petit, Ole Ostermann, Lucien Michaux, Martine Rysenaer, Janine Dugniolle.



2009-02-04 - Dekstre maldekstre: Hélène Falk dorse, Pinto de Sousa, Eric Baert, Georgia Henningsen, Barbara Poterucha, fronte la preleganto Malcel Delforge, Paulo Branco, Katarzyna Kuske, Diemante Aničiene, Jan Amadori, Michael Cwik mansvingante, fotis Francine Sperber (pseudonime Birdino).



2009-02-11 - Dekstre maldekstre: La preleganto Marek Blahuš, Jan Amadori, Hélène Falk, Barbara Poterucha, Danielo Vitali, Marcel Delforge, Pinto de Sousa, Diemante Aničiene, Eric Baert, Georgia Henningsen, Angelos Tsirimokos.



Cwik, Delforge, Blahuš, prelegoj 28-1, 4-2, 11-2



Poterucha, Henningsen, Kuske, prelegoj 18-2, 25-2, 4-3



Pinto de Sousa, Demarque, Larue, prelegoj 11-3, 25-3, 18-3

33 PREPOZICIOJ

Iri **AL** Bruselo.
ANTAŬ nia erao.
APUD mia najbaro.
ĈE mia patro.
ĈIRKAŬ la urbo.
DANK'AL via helpo.
DE fremlando.
DUM unu jaro.
EKSTER la lando.
EL la urbo.
EN la kesto.
FAR la kato,
 la manĝado de la muso.
FOR mia hejmo.
ĜIS la revido!
INTER du baroj.
IOM da salo.
JE via sano;
(JE la kvara horo).
KONTRAŬ la milito.
KUN mia amiko.
LAŬ via diro.
PER viaj manoj.
POR la paco.
POST la strato.
PRETER la rivero.
PRI via teksto.
PRO via rezulto.
SEN mia fratino.
SUB la planko.
SUPER la turo.
 Salti **SUR** la lito.
 Salti **SUR** la litoN.
TRA la muro.
TRANS la landlimo.

33 AFIKSOJ

PREFIKSOJ
BOpatro
DISdoni
EKkapti
FIago
GEpatroj
MALgranda
REdiri
SUFIKSOJ
AC - ĉevalAĈo
AD - parolADo
AJ - komercAJo
AN - bruselANo
AR - arbARo
EBL - legEBLa
EC - grandECo
EG - bonEGa
EJ - hundEJo
EM - kredEMa
END - farENDa
ER - sablERo
ESTR - urbESTRo
ET - arbETo
ID - katIDo
IG - nullIGi
IG - grandIGi
IL - tranĉILo
IN - fratINo
IND - kredINDa
ING - inkINGo
ISM - socialISMo
IST - komercISTo
UJ - plumUJo
UL - avarULO
UM - butikUMi
AFIKSOJ KUNIGITAJ
EBL-EC-o
ESTR-AR-AN-o
FI-AC-UL-o

28 PROVERBOJ POR 28 ALFABETLITEROJ

Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu.
Bona paro por altaro.
Ĉeli anseron, trafi aeron.
Ĉiu medalo posedas du flankojn.
Deziru, ne deziru - ordono estas, iru!
Estu ĉapo laŭ la kapo.
Fadeno iras, kie kudrilo ĝin tiras.
Grandaj malbonoj, grandaj rimedoj.
Gustatempa vorto estas granda forto.
Hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo.
Horo kantas laŭ muzikestraj direktoj.
Inter generaloj parolu pri bataloj.
Ju pli oni posedas, des pli oni avidas.
Jeti bastonon en la radon.
Kia kapo, tia ĉapo.
Laboro farita, ripozo merita.
Mankas klapo en lia kapo.
Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.
Okazo faras ŝteliston.
Pli bone malfrue, ol neniam.
Restu tajloro ĉe sia laboro.
Sunu en la bieno sed pluvu en la ĝardeno.
Serĉe dirite, cele pensite.
Tute libera, kiel birdo aera.
Unua paŝo iron direktas.
aŬdi estas la malvero, vidi estas la vero.
Vortoĵin ŝparu, agojn faru.
Zorgu vivon vian kaj lasu vivi alian.

KIE ESPERANTUMI BALDAŬ

- 6 - 8. marto - **5-a Ibera Renkontiĝo** en Oporto, Portugalio <http://esperanto.pt/ir2009/>
 6 - 9. marto - **Studseminjano**, Schoonloo, Nederlando eosw2008@hetnet.nl
 16 - 21. marto - **Staĝo en Nilvange**, Thionville, Francio. stage.esperanto@laposte.net
 3 - 5. aprilo - **4-a Sabla Printempo** en Pisek, Ĉeĥio. esperanto.pisek@seznam.cz
 3 - 6. aprilo - **2-a Mezorienta Kunveno**, Izmir, Turkio mezorienta.kunveno@gmail.com
 8 - 14. aprilo - **33-a IJF (Internacia Junulara Festivalo)** Giulianova, Italio. ijf.admin@esperanto-it
 9 - 12. aprilo - **Kekso 15 - 25 jaraĝo**, Am Kreuzberg 5, DE-63776 Mömbris. jampgdate@web.de
 9 - 13. aprilo - **BAVELo-Treffen bei "Mama Inge"** Bruenner Str. 20, Aalen. Inge.SIMON
 10 - 17. aprilo - **25a Printempa Semajno Internacia**, St. Andreasberg, Germanio. psi@esperanto.de
 11 - 14. aprilo - **Kongreso de SAT-Amikaro**, Pau, Francio. www.esperanto-sat.info; satamikaro2009@gmail.com
 11 - 18. aprilo - **FRInGoj 2009** en Baugé, Francio. Eliz.Barbay@wanadoo.fr
 14 - 19. aprilo - **Printempa lingva seminario**, Skokovy, Ĉeĥio. Inf.: nechvilep@seznam.cz
 17 - 20. aprilo - **90-a Brita Kongreso**, Salisbury. www.esperanto-gb.org/eab/eab_events/bk2009_pavment-ee.htm; eab@esperanto-gb.org
 18 - 26. aprilo - **34-a Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz**. esperanto-turismo@wp.pl
 25. aprilo - **Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA**. uea@co.uea.org
 25 - 26. aprilo - **Jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio**. dea@esperanto.dk
 1 - 10. majo - **21-a Aroma Jalto** en Ukrainio. volodimir@ukr.net
 3 - 11. majo - **UFE à Troyes, Aube, Francio**. <http://esperanto10.free.fr/>
 7 - 11. majo - **Nacia Interasocia Kongreso de Esperanto**, Troyes, Francio. Claude.Nourmont
 22 - 24. majo - **Jarkongreso de la Sveda Esperanto Federacio**. sefkongr09@esperanto.se
 23 - 29. majo - **61a Kongreso de IFEF Internacia Fervoĵista Esperanto Federacio**, Triesto, Italio.
 28. majo - 3. junio - **Europa Esperanto-Kongreso**, Herzberg. <http://ic-herzberg.de/>. esperanto-zentrum@web.de
 31. majo - 1. junio - **Postkongreso de 61a Kongreso de IFEF**. testudo.ts@gmail.com aŭ noredvd@tele2.it
 5 - 7. junio - **104-a Skotlanda Kongreso** en Dundee. www.skotlando.org. andrew.w.weir@gmail.com
 9 - 17. junio - **31-a Cebalta E. Printempo** en Mielno (PL). Koszalin. [Czeslaw.Baranowski,+48\(0\)503-417-825](mailto:Czeslaw.Baranowski,+48(0)503-417-825)
 10 - 14. junio - **5a Amuza junulara semajnfino**. Inge.Simon, Brünner Str. 20, DE-73431 Aalen+49-7361-360615
 22 - 26. junio - **10a Esperanto-kurso**, Valamo, Heinävesi, Finnlando. eafsekretario@esperanto.fi
 25. junio - 2. julio - **FRESO**, Olštín. Elżbieta Frenszkowska. efrenszkowska@wp.pl
 26 - 28. junio - **2a kongreso**, Jagodina, Serbio, Societo "Sreten Adziĉ", RS-34000 Jagodina, Serbio
 2 - 5. julio - **68a Hispana Kongreso de Esperanto** en Malago. angelarquillos@gmail.com
Diversaj: Grésillon (40Km Angers) <http://gresillon.org/>; Bouresse (40Km Poitiers) : <http://kvinpetalo.org/>

MARCEL DELFORGE

Membro aktiva de Esperantista Brusela Grupo, loĝante en Marcinelle, Charleroi.



Marcel Delforge prelegante la 4an de Februaro en la Esperantista Brusela Grupo pri la temo "Unuaj paŝoj de Esperanto en Belgio".
LEGOMOJ KAJ FRUKTOJ



Legomoj kaj fruktoj laŭ la franca magazino "Esperanto info".